



## Anonci senkoste ĉe interreta FOIRO

Eble vi konas tiun ĉi situacion: vi serĉas certan libron aŭ intencas vendi malnovajn, volas fondi regulan lokan renkontiĝon, havas ofertan aŭ bezonas ian servon, sed vi ne scias kiel publikigi vian deziron rilate al Esperanto. Aŭstria Esperanto-Federacio ekfunkciigis retpaĝon por tiaj anoncoj. Tiaj povas aspekti anoncoj en FOIRO:

Gesucht – Mi serĉas	Angebote – Mi ofertas
<b>Salzburg-Treffen:</b> Wer Interesse hat an regelmäßigen Esperanto-Treffen in Salzburg, schreibe bitte an <u>KONTAKT</u> .	<b>Esperanto-varbiloj:</b> Montru Esperanton per akiro de bonkvalita vestaĵo je modera prezo kaj samtempa varbo por Esperanto. Vidu plu en <a href="http://www.esperantocxemizo.saluton.dk/">www.esperantocxemizo.saluton.dk/</a>
<b>E-o-gazetoj malnovaj:</b> Prezo laŭ stato. <b>Alte E-o-Zeitschriften &amp; Zeitungen.</b> Preis nach Zustand. <u>KONTAKTU</u>	<b>Agentejo/Eldonejo KAVA-PECH</b> (Kongresa kaj Kleriga Agentejo de Petr Chrdle): Ni eldonas librojn, organizas aranĝojn ktp. Vizitu nin sur nia retejo: <a href="http://www.kava-pech.cz/esperanto">www.kava-pech.cz/esperanto</a>
<b>Libro: Quo vadis?</b> de Henry Sienkiewicz; trad. Lidja Zamenhof. <u>KONTAKTO</u>	<b>Eldonejo Stano Marček:</b> lernolibroj, didaktikaj helpiloj kaj sonlibroj de Stano Marček, Zvolenská 15/21, SK-036 01 Martin, Slovakio. Kontakto lpernity: <a href="http://www.ipernity.com/home/stano.marcek">www.ipernity.com/home/stano.marcek</a>
<b>LIBRO Louis de Beaucaire:</b> Kruko kaj Baniko el Bervalo/ Fabeloj de la verda pigo. <u>KONTAKTO</u>	<b>AMIKECO</b> Virino, 42-jara, el nord-orienta Malsupra Aŭstrio, serĉas amikecon kun E-isto vira por komuna libertempo. Muziko klasika, dancado kaj teatro interesas min. Anonco-numero 12-8-2-a1-5. Pera kontakto: <u>FOIRO</u>

La servo estas tute senkosta kaj libera de komerca fremdvarbado. La anoncanto rajtas resti anonima helpe de individua kodo kaj pera kontakto al la retestro. Nove estas, ke nun ne nur AEF-membroj povas utiligi ĝin, sed ankaŭ **ĉiu membro de najbarlanda Esperanto-asocio** (Germanio, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, Slovenio, Italio kaj Svislando).

Male al aliaj jam ekzistantaj retanoncoj ĝi samtempe funkcias senkoste, inter-regione kaj helpe de internacia lingvo. Ĉia anonco estas akceptita escepte de informo pri korespondpeto kaj pri aranĝo, ĉar por tiuj celoj jam ekzistas sufiĉe da aliaj retejoj. Per tiu servo ni esperas iom helpi la kunligon de Esperantistoj el diversaj regionoj kaj doni servon al tiuj homoj, kiu fortigas per sia membreco landajn Esperanto-asociojn.

La retpaĝo de Interreta FOIRO troveblas ĉe: [www.esperanto.at/esperanto-in-oesterreich/esperanto-kleinanzeigen-foiro/](http://www.esperanto.at/esperanto-in-oesterreich/esperanto-kleinanzeigen-foiro/)



© mil, <http://mycartoons.de/>

Tradukado de <http://bildetejo.net/>